

TeKu 154 - Oktobro 2016

Terminara Kuirejo:



Karaj gekolegoj,

nun – ekde apero de TeKu 153 en Marto – ĉiu leginto scias kiel uzi la retan UIC-terminaron *RailLexic 5.0* (erare 4.0). Kiel eĥo ĝis nun alvenis ununura demando pri enigo de ĉapelitaj literoj. Mia diro en TeKu 153 sur paĝo 2, ke ĉe enigo de ĉeĥa *širá trat'* oni nur tajpu „sira trat“, vere ne ĝustas en *RailLexic 5.0*. Tiukaze necesas (se la klavaro ne havas klavon ŝ, aŭ ...) la literon el ĉeĥa teksto aŭ komputila litertabelo kopii. Se la ĉapelita litero troviĝas ne ĉe vortkomenco, ekzemple ĉe ruliĝsurfaco, oni nur enigu „ruli“, kaj post alkalko de lupeo-simbolo aperas en la listo interalie „ruliĝsurfaco“.

Sugeston pri eblo senkromvoje enigi Esperanto-terminon kun supersigna litero en la serĉoalinea vi trovas en la kontribuo dorsflanka.

Mi tre ĝojus scii viajn spertojn kaj demandojn ĉe uzo de la nova plejmoderna alireblo. Certe ĝi faciligas verkadon de fakartikoloj kaj fakprelegoj.

Heinz Hoffmann

Funkcioj en fervoja radiofonia reto GSM-R



Kondukista aparato por komunikado en fervoja radiofonia reto
vidu terminojn 14371 kaj 14796
(bildo: Wikimedia S. Terfloth)

Pri terminaraj decidoj en Varna

La partoprenantoj de 2 kongresaj terminaraj kunsidoj 24-an kaj 25-an de Majo 2016 decidis jenajn terminojn el TeKu 152 kaj 153:

TeKu 152

04691 trako-interplektaĵo kvarrela

Komento La kvarrela interplektaĵo estas uzata

- ĉe samŝpuraj trakoj, se pro unutraka ponto, mallarĝa tunelo, konstruejo ktp la (dumtempe) mallarĝa relvojo ne ebligas daŭrigon de du paralelaj trakoj (kiel montras la skizo sur paĝo 1, tiukaze ekzistas du kontraŭdirektaj interplektaĵoj),
- ĉe diversŝpuraj trakoj, se pro tro malgranda ŝpurdiferenco (multfoje 1435 mm / 1520 mm ĉe limoj de iama Sovetunio) la trirela solvo laŭ 09822 ne ebligas sufiĉan breĉodistancon por trapaso de radflaŝoj.

09822 trako-interplektaĵo trirela


Komento La trirela interplektaĵo estas uzata sole ĉe diversŝpuraj trakoj kun por radflaŝoj sufiĉe granda ŝpurdiferenco (ekzemple 1435 mm / 1000 mm), cele ŝpari terenon ĉe du paralelaj trakoj kun nur maldensa trafiko. (La foto sur paĝo 1 montras ne trirelan trako-interplektaĵon, sed du eŝpurajn trakforkojn en trirela trako.)

plue TeKu 152**06109** trafikсистема distribuo**07107** radringa grataĵo**11367** energikonsumo specifa (noto: pasaĝertrajno)**12049** trajnkompleto entunelsava

Komento Al origina propono 1):
Ne temas pri savi tunelon.
Al origina propono 2):
Kvankam savo de pasaĝeroj estas la ĉefa – laŭdifina – celo, la agado ebligas ankaŭ materiajn savojn.

08290 frogofino**08155** signalo atenta

Komento La origine proponita vorto „averta” ne respondas al la difino. Atento kaj averto estas malsamaj nocioj.


TeKu 153**14834** frogopinta angulo**00319** trak-disetenda angulo**14835** frogofina larĝo**14836** frogalkomenca breĉodistanco**05940** frogala/kontraŭrela breĉodistanco**05941** nadlorela breĉodistanco**Kaj ankaŭ ĉifoje denove: Novaj taskoj – novaj taskoj – novaj taskoj****14371**

Voko al ĉiuj anoj de antaŭdifinita grupo interne de loke limigita geografia tereno, ĉe kiu sole la konektanto povas paroli dum ĉiuj aliaj grupanoj aŭskultas.

ĉeĥa	<i>skupinové volání</i>	germana	<i>Sammelruf</i>
franca	<i>appel radiodiffusé</i>	angla	<i>broadcast call</i>

Terminproponoj:

- 1) grupvoko unudirekta
- 2) grupvoko informa (noto: GSM-R, VBS)

14796

Voko al ĉiuj anoj de antaŭdifinita grupo interne de loke limigita geografia tereno, ĉe kiu ĉiuj grupanoj povas paroli dum ĉiuj aliaj grupanoj aŭskultas, ekzemple inter trajntrafikestro kaj personalo en liniosekcio.

ĉeĥa	<i>skupinové volání</i>	germana	<i>Sprachgruppenruf</i>
franca	<i>service d'appel vocal de groupe</i>	hungara	<i>hang csoport hívás szolgáltatás</i>

Terminproponoj:

- 1) grupvoko plurdirekta
- 2) grupvoko konferenca (noto: GSM-R, VGCS)

04744




Malkonektilo estigita per izoliloj enmetitaj en kontaktlineo kaj ekipita per glitiloj aŭ similaj komponantoj, por konservi seninterrompan kurentodeprenon.

bulgara	<i>изолатор междусекционен</i>	itala	<i>isolatore di sezione</i>
ĉeĥa	<i>úsekový izolátor</i>	kroata	<i>sekcijiski izolator</i>
dana	<i>ledningsadskiller</i>	pola	<i>izolator sekcynny</i>
franca	<i>isolateur de section</i>	rumana	<i>izolator de secționare</i>
germana	<i>Strecktrenner</i>	slovena	<i>odsekovni izolator</i>
hungara	<i>szakasz-szigetelő</i>		

Terminproponoj: 1) izolil-aranĝo ŝaltsekcia
2) malkonektilo ŝaltsekcia

Komento: Tia malkonektilo troviĝas en stacioj por necesakaze disigi ŝaltsekciojn.

06726



Kontaktlineo-aranĝo por izolado inter du najbaraj kontaktlineaj sekcioj, kiu tamen ebligas seninterrompan kurentodeprenon.

ĉeĥa	<i>misto styku</i>	itala	<i>punto di sezionamento</i>
dana	<i>mast med kobler</i>	kroata	<i>postrojenje za sekcioniranje</i>
franca	<i>point de sectionnement</i>	pola	<i>kabina sekcynna</i>
germana	<i>Strecktrennung</i>	rumana	<i>post de secționare</i>
hungara	<i>szakaszkapcsoló állomás</i>	slovena	<i>stikališče</i>

Terminproponoj: 1) kontaktlineo-aranĝo sekiiga
2) kontaktlineo-aranĝo por sekcio-apartigo
3) kontaktlineo-aranĝo sekiizola

Komento: Tia aranĝo troviĝas ekster stacioj kombine kun kontaktlinea streĉlongo por necesakaze malŝalti kontaktlinean sekcion.

14798



Centralizita aŭ distribuita relvojekipaĵo, kiu laŭ apliknivelo de trajnsekurig-sistemo ETCS kaj laŭ informspeco ebligas kontinuajn aŭ punktoformajn informinterŝanĝojn inter veturvojo kaj veturilo, por garantii sekuran trajnobservadon.

ĉeĥa	<i>trátová část zařízení</i>	germana	<i>streckenseitige Ausrüstung</i>
franca	<i>o équipements latéraux de voie</i>		

Terminproponoj: 1) relvojekipaĵo ETCS-rilata
2) relvojekipaĵo informinterŝanĝa (noto: ETCS)
3) relvojekipaĵo trajnobserva (noto: ETCS)

Krei adaptitan „Windows“-klavaron

La klavaro per la elekto de la literoj presitaj sur la klavoj estas adaptita al la lingvaj bezonoj en la respektiva lando. Tial literojn ne uzatajn en tie parolata lingvo tre verŝajne ne estas troveblaj. La bezono ekster aparta tekstprilabora programo sorĉi Esperanto-tekstojn sur la ekranon devigis iri malelegantajn “x”-ajn aŭ “h”-ajn ĉirkaŭvojojn, pro ĉiu ĉapelita litero apliki la simbolo-tabelon (“Windows“-aldonaĵo), tra la intera storilo kopii la specifan literon el ekzistanta teksto.



La kreskanta kvanto de Esperanto-lingvaj retmesaĝoj instigis min serĉi alian vojon. Pri la trovita mi estas tute kontenta.

Ĉar la kodo sendata de kutima 105-opa klavaro al la komputilo premante certan klavon sendepende de la surklava litero estas ĉiam la sama, la operaciuo (konkrete Windows 7) uzas interpretan tabelon interligantan la klavokodon kun litero aŭ simbolo. Tiu tabelo estas ne nur elektebla en la sistemadapta menuo el longa listo de “Afrikaans” ĝis “Yoruba”, ĝi estas adaptebla aŭ memdifinebla per senkosta programo nomata “Keyboard Layout Creator”.

La programo permesas difini propran interpretan tabelon sur la bazo de la kutima klavoskemo okupante liberajn lokojn per aldonaj simboloj. Per difino per “c+Ctrl+Alt” ekzemple eblas tajpi “ĉ” kaj simile. Estigas ekzemple ordinara germana klavarskemo kun supersignitaj literoj – aŭ ĉeĥa, aŭ dana, aŭ ... depende de la elektita bazo. Avantaĝe estas, ke neniu litero ŝanĝas sian lokon.

La bildoj montras la skemon de germana klavaro kun aldonitaj Esperanto-supersignitaj literoj supre sen premita aldona klavo (ciferoj kaj minusklaj literoj) kaj malsupre la saman kun aldona premitaj “Alt”+“Ctrl”.

Por detala priskribo de la bezonataj paŝoj tie ĉi mankas la spaco. Se vi interesiĝas bv. retmesaĝe informi la redaktoron.



Guido Brandenburg

Faka Komisiono de IFEF:

Gvidanto: Jan Uldal Niemann
 Adreso: Hovedvagtstræde 9E, 1
 DK-3000 Helsingør
 Telefono: +045 71 70 63 83
 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Terminara Sekcio:

Sekretario: D-ro Heinz Hoffmann
 Adreso: Finstere Gasse 2
 DE-01445 Radebeul
 Telefono: +049 351 83 85 877
 Retadreso: hoffmann-ifef@kabelmail.de